SOMERAJ UNIVERSITATAJ KURSOJ
asocio sen profita celo

COURS UNIVERSITAIRES D'ETE
association sans but lucratif

Boîte Postale 9, B-~~4000~~ Liège X — C.C.P. (poŝtĝirkonto) : Belgio - 1850.91

Jr. J. CHRISTIAENS
Jwtr. Lipoluttraat 26
3500 HASSELT

Liège, la 19-9-1980

Estimata Sinjor(in)o,

Kiel vi certe scias, Someraj Universitataj Kursoj jam de jaroj kontribuas al la disvastigo de esperanto en la sciencan medion kaj provizias nian internacian literaturon per verkoj, kies intereso, minimume lingva, estas nemalhavebla.

Sed tiu asocio, kiujn celojn vi certe aprobas, estas asocio sen profita celo, laŭ la belga leĝo. Kvankam ĝia agado estas internacia, SUK restas belga asocio kaj laŭstatute 2/5 el siaj membroj devas esti belgaj.

Vi tuj komprenas, ke manko da Belgoj aŭtomate bremsas la agadon, kiun ni povas disvastigi eksterlanden por varbi al SUK eminentajn sciencistojn. Pro tio ni hodiaŭ turnas nin al vi, petante vian helpon por informi viajn membrojn pri SUK kaj ĝia agado, kaj instigi ilin fariĝi membroj. Tri Belgoj gajnitaj signifas preskaŭ aŭtomate 5 novajn membrojn por la asocio.

Membro pagas jaran kotizon de 750 f (sep cent kvin dek belgaj frankoj) kiu rajtigas sin voĉdoni dum la membrokunveno sed precipe aĉeti po unu ekzemplero de la eldonitaj kursotekstoj je studenta tarifo, t.e. duone. Al tio evidente aldoniĝas la morala subteno al tiu pionira agado sur la scienca kampo.

Ni ne dubas, ke kompreninte nian celon kaj problemon, vi efike kontribuos al tiu kampanjo kaj ni tutkore dankas vin.

Restante je via dispono por plia informado, ni kore salutas vin.

Por la Estraro,

Dro Pol DENOËL

Léon J. HAUREGARD